

& Interkona balado:

< Rekante 21 el 37 batoj oblaŭ tiom da strofoj kiom da homoj en la ĉeno, dum 2 minutoj por ĉiu kvino da dancantoj. Verkis Martin Strid (2016) kaj komponis sur bazo de dalekarla marŝmelodio. La strofoj estas nur ekzemploj – ĉiu dancanto elpensu kaj kantu mem sian propran unu strofon, ĉu majore ĉu minore. Klarigo (*): '1 La kantinto premu la manon de sia dekstra – do malantaŭa – najbaro por signali ke tuj estos ties vico kanti sian strofon.>

(#Melodio:

<:37> (

(#Majore: /do doTi dore mifa; soso somi dodo domi; remi reTi SoTi remi; dodo doTi dore mifa;)

?

(#Minore: /La LaSi LaTi dore; mimi mido LaLa Lado; Tido TiSi MiSi Tido; LaLa LaSi LaTi dore;)

(#Rekantaje: mi mido LaLa Lado; mimi remi fami; rere reTi SoSo SoTi; rere dore mire; doTi LaTi dore miSi La La a)

)x5)+

(&Strofoj:

'1 Estas mi sveda homo ; Martin estas mia nomo ; pri baladoj mi parolas ; kaj violonludi volas.

(×: **Dankon! Parolon donu ; dekstren* en la ĉeno ; ke ni ankaŭ tiun konu ; ĝojaj en kompreno ; kaj aŭskultu ĉiun ĝis reveno.**)

'2 Estas mi joruba homo ; Ĉinua mia nomo ; politikon mi parolas ; trovi koramikinon volas.

'3 Jen mi portugala homo ; Maria Magdalena nomo ; pri aŭtoj mi parolas ; trinki teon ofte volas.

'4 Estas mi hinda homo ; Raĝiv estas mia nomo ; en teatro drame rolas ; kaj vegane manĝi volas.

'5 Estas mi japana homo ; Kuregaŭa mia nomo ; sociologion parolas ; lerni esperanton volas.

'6 Estas mi araba homo ; Safi estas karesnomo ; mi validajn varojn vendas ; kaj per poŝto ilin sendas.

'7 Estas mi hebrea homo ; Joŝi estas mia nomo ; komputilludojn mi parolas ; eviti militservon volas.

'8 Estas mi kurda homo ; Arda estas mia nomo ; pri ruinoj mi parolas ; kaj kuiri fiŝon volas.

'9 Estas mi usona homo ; Ĝenni estas mia nomo ; mi pri vojaĝado parolas ; aĉeti ciklomobilon volas.

'10 Estas mi brazila homo ; Ĵavi estas mia nomo ; spiritisme mi parolas ; kaj ĉendancon lerni volas.

'11 Estas mi amhara homo ; Hajle estas mia nomo ; pri progreso mi parolas ; pentri vian portreton volas.

'12 Mi estas pola homo ; Danko estas mia nomo ; amrilatojn mi komprenas ; dance cirklas mi kaj ĉenas.)

